

Numero: 328.
Septembro 2019.

27-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



ESPERANTO

Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Aŭtuna animagordo

Tagoj, semajnoj, eĉ sezonoj flugas rapidege kaj denove estas septembro.

Forpasis la varmega somero kaj la noktoj komenciĝas malvarmiĝi.

En septembra vespero mi sidas en nia ĝardeno kaj mi revadas.

Kiom da somero, kiom da aŭtuno forflugis super mia kapo. Nun mi denove nostalgias kaj mi pensas pri la pasinto.

Antaŭ nelonge mi fariĝis esperantisto (antaŭ nelonge?) Ho, jam pasis almenaŭ kvar aŭ kvin jardekoj. Tamen ŝajnas al mi, ke ĵus hieraŭ mi komencis lerni la zamenhofan lingvon.

Jes estis somere, kiam mi renkontis lernolibron en nia vilaĝa biblioteko.

Lingvo, kiun ankaŭ mi povos ellerni – mi pensis feliĉe. Prave, Esperanto estis tiu fremda lingvo, kiun mi proprigis kaj mi parolas flue.

Dum mia vivo mi lernis kelkajn lingvojn, sed ĉiam la lernota lingvo fariĝis por mi nur sonĝo, sed Esperanto estis tute alia.

Ĝi reviviĝis en mi kaj donis al mi ĉielan feliĉon. Mi povis kompreni min kun fremdaj homoj ne parolantan la hungaran lingvon.

Jes Esperanto vivas en mia koro. Oni jam ne povas konvinki min, ke krom Esperanto ekzistas pli bonaj kaj utilaj lingvoj.

Ankaŭ la naciaj lingvoj estas tre utilaj kaj mi instigas miajn geamikojn, ke ili lernu tiujn. Sed ili donu ŝancon al Esperanto, kiel mi en tiu varma somero.

Lerni lingvojn estas necese. Kiu ne scias fremdajn lingvojn, tiu estas perdita homo.

Tamen, se la zamenhofa lingvo estus tutmonde akceptita, nia vivo iĝus pli facila kaj simpla.

Ĉu mi erarus? Laŭ mi ne.

Tiuj ĉi pensoj zigzagis en mia cerbo dum tiu septembra vespero sidante en la ĝardeno aŭskultante la muzikon de la ĉieloj.

— Redaktanto —



Kiun lingvon?

Ĉu vi jam cerbumis, kiun lingvon ni parolos, kiam ni renkontos inteligentajn estaĵojn en la universo?

Kiel ni komunikos kun ili? Ĉu estos ia universala lingvo, kiun oni parolas sur ĉiuj planedoj, kie vivas eksterteruloj?

Kompreneble ankaŭ ni teranoj devos ellerni tiun lingvon, se ni deziras kompreni nin.

Eble kiu ne parolos tiun ĉi kosman lingvon, tiu estos barbaro kaj la intergalaktika konsilantaro ne permesos aliĝi al la komunumo.

Ĉu ankaŭ en la kosmo ekzistas tiom multe da lingvoj, kiel sur nia terglobo? Eble nia Tero estas unusola kaj la ĉielaj „homoj” komprenas unu la alian pli facile.

Pro io ni homoj estas punitaj kaj tial ekzistas multaj lingvoj sur la terglobo.

Estus bone scii la veron. Sed ankoraŭ la kosmo ne malkaŝas sian sekreton.

Ni homoj estas malbenitaj, kaj ni homoj devas lerni fremdajn lingvojn.

Eble la eksterteruloj ne parolante komunikas. Ili uzas la forton de la pensoj aŭ la sentoj.

Sed kia estas tiu mondo, kie mankas sonoj, vortoj kaj frazoj. Oni nur rigardas unu la alian mute, eĉ unu vorteto ne forlasas ilian buŝon.

Laŭ mi ankaŭ ili devas ekparoli, se ili deziras transdoni, kio kaŝiĝas profunde en la koro kaj cerbo.

Estus bone renkontiĝi kun eksterterulo kaj demandi ilin, kiel ili opinias pri Esperanto?

Bedaŭrinde ni teraj homoj ankoraŭ ne rekonis la gravecon de tiu ĉi grandioza lingvo.

Mi ŝatus scii ilian opinion pri la zamenhofa lingvo. Certe ili mirus, ke ni homoj indiferece parolas pri ĝi.

Mi estas konvinkiĝanta, la eksterteruloj enviadus, ke ni homoj havas tian bonan, logikan kaj facile ellerneblan lingvon.

Ni atentu, ĉar se la eksterteruloj sciiĝos pri Esperanto, ili proprigos ĝin.

Verŝajne ni meritis, ke la intergalaktika konsilantaro punu nin, kial ankoraŭ Esperanto ne estas vaste disvasiĝinta sur Tero.

— Ŝaŝa —



Flugi, kiel birdo



La virino sidis ĉe la fenestro kaj ŝi senmove rigardis la firmamenton, kie malgrandaj birdoj flugadis.

Ekstere estis sunriĉa aŭtuno. Ankoraŭ la folioj de la arboj ne flaviĝis. Nur kelkaj sekaj falis surteren.

Tamen oni sentis, ke jam estas aŭtuno. Tristeco ŝvebis en la aero. Tio ĉi vidiĝis ankaŭ en la okuloj de la homoj. La matenoj kaj vesperoj jam estas malvarmetaj kaj oni bezonas mantelon. Vere tage ankoraŭ suno arde brilas. Kvazaŭ la sunradioj protestus kontraŭ la malvarmo kaj ili volus prui sian forton.

La virino sidis senmove. Ŝiaj okuloj revante rigardis la flugantajn birdojn.



Ŝi ĉiam songis, ke en iu tago ankaŭ ŝi povos flugi.

Kiom bonege estus tio! Tie supre proksime al la nuboj admiri la abismon kun la pejzaĝo.

Ŝi ankoraŭ neniam veturis per aeroplano.

La virino timis de tiu fluganta maŝino.

Flugi, kiel birdo estas tute alia. Tiam oni liberiĝas de ĉio. Aŭdi la muĝadon de la aero kaj senti ĝian karesadon.

Ho, se ankaŭ ŝi povus esti birdo! Ekflugi kun ili kaj traveturi la tutan landon, eĉ vidi la maron kaj oceanon.

Ŝi preskaŭ ekploris, kiam ŝi rekonsciiĝis, ŝi estas ligita por ĉiam al tiu damnita ĉambro. Ŝi neniam povos forlasi ĝin.

Ŝi devos sidadi de tago al tago en la rulseĝo kaj rigardi la firmamenton, serĉante tie flugantajn birdojn.

Estas tagoj, kiam la virino vidas neniom da birdoj. Dio scias kial, la birdoj tiutage ne emas flugi almenaŭ antaŭ ŝia fenestro.

Sed alitage la birdoj flugadas senhalte. La tuta firmamento estas plenplena de birdoj.

En iu tago malgranda birdo flugis sur la fenestrokornicon. Tio ege surprizis la virinon. Ŝi ankoraŭ ne vidis tiom proksime birdon.

Ili mute rigardis unu la alian. En la okuloj de la birdo ekbrilis stranga lumo. Kvazaŭ ĝi invitus ŝin: „Venu kun mi!”

La virino etendis siajn brakojn al la birdo. Ĝi ektimis kaj forflugis. Ŝi ne vidis plu la birdon.

Ŝi vane serĉis ĝin sur la branĉoj de la proksimaj arboj aŭ sur la blua ĉielo.

Pro tio la virino malĝojiĝis. En la lito vespere ŝi eĉ ploretis. Ankaŭ tiu eta birdeto forlasis ŝin.

Terure!

Alitage ŝi denove levis siajn okulojn al la firmamento. Eble ŝi ekvidos la birdon.

Sed ne. La birdo malaperis. Povis estis, ke nur rekonis ĝin inter la multaj flugantaj birdoj, aŭ ĝi ŝanĝiĝis. La birdo estas tie, nur ĝi kaŝas sin.

Kial ĝi farus tion ĉi. Ja, ĝi flugis sur la fenestrokornicon.

La virino nepre sciis, tiu ĉi birdo deziras de ŝi ion.

Jam ŝi tute rezignis, kiam posttagmeze dum la sunsubiro ĝi ekaperis.

La birdo fikse rigardis la virinon, kiu denove etendis siajn brakojn al ĝia direkto. Sed nun la birdo ne forflugis. Ĝi iomete eklevis siajnflugilojn kvazaŭ ĝi mesaĝus: „Venu kun mi!”

La virino kolektis sian forton kaj per siaj manoj ŝi tiris sin ĝis la fenestrokornico. La birdo denove ekmovis siajnflugilojn kaj ĝi retropaŝis kelkajn paŝojn. La virino sekvis ĝin kaj ŝi ĵetis sian kriplan korpon trans la fenestron.

Kaj okazis miraklo. La virino flugis kaj flugis. Ĉesis la tempo kaj la spaco. Malaperis la abismo, ankaŭ ŝi iĝis birdo. Granda, blanka birdo, kiu povas flugi ĝis la ĉielo.

La preterpasantoj trovis ŝin apud la deketaĝa domo kuŝante sur la trotuaro.

Strange sur la korpo estis videbla nenia vundo aŭ sango. Kvazaŭ ŝi estus dormanta, eĉ la lipoj ridetis, kiel kontenta homo.

— Apáti Kovács Béla —



POEZIO

Oni diras, la perloj kaŝiĝas kaj estas tre malfacile trovi ilin.

Hungario jam donis multe da grandiozaj kaj talentaj poetoj, verkistoj al Esperanto literaturo.

Ili estas niaj trezoroj. Ili riĉiĝis nian kulturon.

Grandparte ĉiu konas niajn elstarajn verkistojn, poetojn: Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Gergely Mihály, Hules Béla, Kökény Lajos, Szatmári Sándor k.t.p. ankoraŭ mi longe povus daŭrigi la liston.

Antaŭ kelkaj tagoj, tute hazarde mi sciiĝis pri hungara poeto Lénárd József.

Ni vizitas saman hungarlingvan, literaturan paĝon. Ni jam ofte renkontiĝis ankaŭ persone. Li verkis belegajn poemojn kaj mi kutimis aperigi tie miajn fabelojn, eĉ unufoje ni kune vojaĝis al Transilvanio.

Bedaŭrinde neniam ni menciis Esperanton.

Antaŭ nelonge Jozefo ekaperigis sian poemon: A negyedik dimenzió (La kvara dimensio), kiu nun estos legebla ĉi tie. Poste baldaŭe mi legis lian alian poemon.

Estus tre bone kaj laŭdinde se Jozefo retroviĝus al ni kaj la tuttera esperantistaro povus ekkoni liajn belajn poemojn.

Mi petas lin, anankaŭ en la estonto ĝojigu nin per multaj, belegaj poemoj.

Espereble li aŭdos mian voĉon kaj ankoraŭ ni ofte renkontiĝas kun liaj poemoj.

— Apáti Kovács Béla —

A negyedik dimenzió

Minden versemben egy kirándulás éled.

Titkot sétálók. Elrepült csókok
repítenek újra és visznek ' sétányok.

Odébb egy kis pad. Magam köré gyűjtöttem
zord magányomat. Az egyensúlyban
fogóztam, s szédülésben megfogott a pad.

Ott ültem. Szemem becsukva.

Gondolkodás.

Szaladó évek, s egyszer csak furcsa
lett az érzés átléptem más téridőbe.

A távozásban éltem, a pillanatok
idejét loptam, hogy megmaradjak
egyensúlyban. Kettévált a fény-téridő.

S így született meg, bennem is a negyedik
dimenzió, mely lelkek otthona.
Csak becsukom szemem és látom azóta.

·
·
·

La kvara dimensio

Ĉiu el miaj poemoj estas akompanata de
vojaĝo.

Sekretaj promenantoj Flugantaj kisoj
flugu denove kaj portu vin sur promenejoj.

Iomete. Mi kunvenis ĉirkaŭ mi
mia severa soleco. En ekvilibro
Mi ekprenis la benkon kaj eksentis min.

Mi sidis tie. Miaj okuloj estas fermitaj.
Pensas.

Jaroj pasis, kaj strangaj fojoj
fariĝis sento, ke mi translokiĝis al alia spaca
tempo.

Mi vivis laŭ mia foriro, la momentoj
Mi ŝtelis vian tempon por resti
ekvilibra. La lum-spaca tempo fariĝis du.

Kaj jen kiel mi naskiĝis, kaj mi estas la
kvara
dimensio kiu estas la hejmo de animoj.
Mi nur fermas miajn okulojn kaj vidas ĝin
de tiam.



POR INFANOJ



La soifa floreto

Arbarorande vivis ruĝa floreto. Naskiĝinte ĝi tre ĝojegis.

— Ho, kiom belega estas la vivo! Mi loĝas arbarorande. Proksime estas altaj, grandaj arboj kaj densaj arbustoj. Certe ili helpas min, se mi havos problemon.

Sed ĝi eraris. La arboj kaj la arbustoj ne estis helpemaj, eĉ ili koleris pri ĝi.

— For de tie ĉi, floreto! — ili diradis ĉiutage. — Tiu ĉi loko estas nur la nia. Ni ne deziras dividi nian vivteron kun vi.



La floroj ne povas movi. Kie ili naskiĝas, tie ili devas vivi.

La vilaĝo estis malproksime kaj ankaŭ ekskursantoj evitis la ĉirkaŭaĵon. La ŝanco estis tre malgranda, ke iu deŝiras la floretan kaj hejmenportas.

Baldaŭ la floreto spertis, kiom malfacila estas la vivo arbarorande.

La arboj kaj arbustoj ankoraŭ la akvon desuĉis de ĝi. De tago al tago ĝi fariĝis pli soifa.

Suno arde brilis kaj ĝi komencis sekiĝi.

— Donu iom da akvo! — ĝi petegis al la arboj kaj arbustoj.

— Ni ne estas stultaj doni al vi akvon — ili diradis cinike kaj ili ridaĉis pri la suferanta floreto.

Ĝi ege suferis. En ĝiaj florfolioj apenaŭ estis vivo. Se baldaŭ ne ekpluvos, tiam ĝi mortos.

La arboj kaj arbustoj atendis tion. Ili mokante rigardis la floretan.

En iu mateno homoj alvenis kun arbohakiloj kaj ili komencis dehaki la arbojn kaj la arbustojn. Onidire tie ĉi konstruiĝos la domo de arbaristo.

Kiam jam la arbohakistoj faris sufiĉe da granda lokon por la domo, ili ekripozis.

Strange neniu piedpremis la floretan, kvankam ili tie laboris, hakis la arbojn. La floreto finrigardis la morton de la arboj kaj arbustoj.

Ili estis kruelaj al ĝi, tamen la floreto tre kompatis ilin. Ĝi larmokule ĝemadis, kiel oni forportis la arbotrunkojn per traktoroj kaj la branĉojn kiuj kun la arbustoj estis bruligitaj.

Ĝi bone sciis, ke baldaŭ ankaŭ ĝi mortos, ĉar la soifeco tre torturis ĝin. Krome la arbohakistoj certe ankaŭ ĝin ne indulgos. Ĝis nun ĝi havis bonŝanson kaj ĝi sukcesis saviĝi.

Neatendite ankaŭ la arbaristo alvenis kaj li iris al la ripozantaj laboristoj.



Antaŭ ol li salutintus ilin, li ekkriis:

— Ho, kiom admirinda floreto! Tie ĉi estos nia florgardeno. Mia edzino tre ŝatas la florojn. Homoj, mi petas vin, atentu pri ĝi! Ve, ĝi jam preskaŭ sekiĝis. Donu al mi tiun sitelon da akvo!

La arbaristo akvumis la floretan, kiu reviviĝis kaj ĝi avide trinkis la freŝan akvon.

Tiel ĝi saviĝis de la morto. Efektive, kiel diris la arbaristo, kiam la domo konstruiĝis tie ĝi estis la florgardeno. En ĝi vivis feliĉe la florto.

Malgraŭ la bona vivo ĝiaj florkukoloj ofte pleniĝis de larmogutoj, ĉar ĝi kompatis la arbojn kaj arbustojn, kiuj vivis arbarorande.

Ellernu el tiu ĉi fabeleto, ne estas bona afero, se nia koro estas plena de malamo, oni devas ankaŭ pardoni.

— La onklo Adalberto —



Domoj

Domoj

